Tuttaga ekskurso en proksima okcidenta sudo de Parizo

Por partopreni, anoncu vin rapide, antaŭ la 10a de marto 2018

La tuttaga ekskurso de la SAT-Amikara kongreso, kiu okazas la mardon, post la laborkunsidoj, estas tradicie malfermata al ĉiuj interesataj esperantistoj, sen devigo pagi kongreskotizon por tiuj, kiuj deziras partopreni nur la tuttagan ekskurson. Kompreneble, ĉiuj partoprenontoj al tiu tuttaga ekskurso, ĉu gastoj ĉu kongresanoj, pagas la sumon, kiu respondas al la kostoj de la buso, de la tagmanĝo, kaj de la gvidado de la vizitoj.

Ni rendevuos matene en la mediateko, kie ankaŭ troviĝas la Urba Muzeo :

Ĉar la ĉi-jara kongreso temas kaj interesiĝas pri la junularo, mi pensis, ke estas bone venigi la kongresanojn en la novan urbon Saint-Quentin-en-Yvelines, kie vivas multaj junuloj, ne nur ĉar la urbo estas juna, sed ankaŭ ĉar ĝi estas urbo de studentoj, pro la ĉeesto de multaj lernejoj kaj de la universitato. La servoj de tiu urbo, kaj la elektita arkitekturo montras, kiel estas organizitaj la nuntempaj modernaj povoj en la socio, kiu formas kaj akceptas niajn junulojn.

La Universitato Versailles-Saint-Quentin-en-Yvelines

La posttagmeza vizito de la Kaproza Kastelo (Château de Chevreuse) kaj de la Domo de la Altvala Natura Parko de Kaprozo (Maison du Parc Naturel de la Haute Vallée de Chevreuse) montros interesajn kontrastojn inter la nuntempo kaj la pasinto, inter la nuna urba vivo kaj la kampara vivo, kiam ĝi ankoraŭ ekzistas. La Altvala Natura Parko de Kaprozo estis sen hazardo kreita por limigi la disvastiĝon de la Nova Urbo.

Kaproza Kastelo, sidejo de la Domo de la Altvala Natura Parko de Kaprozo



Kaprozo, mezepoka urbo

Eblos ankaŭ pripensi pri la longa daŭro de la konfliktoj inter posedantoj kaj malriĉuloj, inter povuloj (aŭ profituloj) kaj senpovaj ekspluatitoj. Interese ankaŭ estos vidi, kiel la konstruantoj de la

nova urbo uzis la historiajn konstrumanierojn por konstrui samspecajn aŭ aliajn laŭfunkciajn konstruaĵojn.

Loĝejoj konstruitaj laŭ arkitekturo influita de Luaraj kasteloj :

Dum la preparado de tiu ekskurso, mi renkontis junulinon, kiu deĵoris en la Urba Muzeo, kaj kiu multe interesiĝis pri Esperanto, precipe kiam mi informis ŝin pri la Esperanto-koncerto de la 17a de decembro 2017, kiun organizis la loka Esperanto-grupo ILO. Ŝi donis al mi karton sur kiu estas skribita frazo de Platono: "La muziko donas animon al niaj koroj kaj flugilojn al la penso". Ŝi zorgas pri internaciaj kulturaj projektoj en la kadro de la Universitato, kaj kompreneble interesiĝas pri nia kongreso.
La vizito de grupo el niaj kongresanoj en la nova urbo Saint-Quentin-en-Yvelines, ne estos nur agrabla promenado por la partoprenantaj kongresanoj, tio estos ankaŭ agado, kiu plifortigos la lokan vivon de la asocio ILO, (la loka esperanta asocio), kies pluraj membroj estas ankaŭ membroj de SAT-Amikaro, kaj kies sidejo tien translokiĝis antaŭ kelkaj monatoj. Ansofi.

Prezo de la ekskurso (mardon la 3an/04/2018, reveno antaŭ la 17a30) :
52 € (Buso, gvidado, tagmanĝo)

Bonvolu fari apartan ĉekon profite al SATAMIKAROPARIZAGRUPO

Sendu ĝin antaŭ la 10a de marto 2018 al :

Thérèse SABATIER : 21 rue Pasteur 94490 ORMESSON/MARNE